

# La Progresanto

REDACTIE-  
COMITE

G. P. DE BRUIN  
G. J. DEGENKAMP  
W. F. KRUIT

**STUDIEBLAD VAN DE BOND  
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**  
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL  
f 1.75 per jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.  
Postgiro 331133

H. KUYT  
JAC. LEM JR.  
H. VAN LIER  
J. VAN SCHEEPEN  
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

## MANKIPOVAJ VORTOJ

Preskaŭ ĉiu esperantisto deziras trovi por ĉiu vorto en sia nacia lingvo konvenan tradukon. Ĉe tio oni tamen ne konsideras, ke ĉiu lingvo havas aron da vortoj, kiuj ne permesas rektan tradukon en alian lingvon, ankaŭ ne en Esperanton. Se ni tamen nepre volas formi laŭvortan tradukon, la rezulto ofte ne estas kontentiga.

Unu el niaj legantoj petis nian opinion pri la vorto „nemankipova“ (onmisbaar), kiu ŝajnas al li nebela kaj anstataŭiginda per „nepre necesa“ aŭ io simila.

Verdire ni miras, ke ne pli frue nin atingis tia opiniesprimo. Kvankam la traduko estas klara kaj nepre korekta, ĝi ne estas bela. Kial? Ĉar ĝi estas tordita, kaj pro la nekutimaj interliga „i“ kaj la finaĵo „pova“ neagrable aŭdiĝas. La traduko ne havas la deziratan sonefektan.

Havante en la nederlanda lingvo la vortojn „onmisbaar, onfeilbaar, strijdbaar“ kaj kelkajn similajn, en kiuj la sufikso „baar“ ne estas tradukebla per „ebla“, ni tradukas ilin per la finaĵo „pova“. Malofta uzado de tiaj vortoj ne ĝenas. Kelkfoje ni eĉ ne sukcesas trovi pli trafan formon. En la frazo „en religiaj aferoj la katolikoj konsideras la papon neeraripova“ oni malfacile sukcesus trovi pli trafan tradukon ol la nebelan „neeraripova“. Tamen, en la praktiko ni kutime ne uzu tiajn formojn, sed ni serĉu vortojn pli fluajn, kiuj esprimas la saman sencon, kvankam en alia maniero. „Nemankipova“ signifas: kio ne

povas manki aŭ kio ne manku. Kaj kial ni ekzemple dirus pri „Plena Vortaro“, ke ĝi estas nemankipova libro, anstataŭ ke ĝi manku al neniuj esperantisto? Imagu, ke la nederlanda lingvo disponus pri pli multaj vortoj finĝantaj per „baar“, en kiuj tiu sufikso ne signifas „ebla“. Imagu, ke ni havus „helpbaar, staanbaar, zitbaar, werkbaar“! Tiukaze ni eble serĉus rektajn tradukojn kiaj „helpipova, staripova, sidipova, laboripova“ kaj ni certe povus renkonti frazojn kiaj „pro reŭmatismo li estas nestaripova, pro senlaboreco li estas nepagipova, pro malsaneco li estas nelaboripova“ k.s.

Konklude: ni uzu formojn kun „pova“ (ankaŭ „vola“ kaj „deva“) kiom eble plej malofte kaj nur, se ili vere ne estas anstataŭigeblaj per formoj pli fluaj kaj simplaj. En ĉiuj aliaj okazoj ni diru: „ne povas manki, estas nepre bezonata, ne povas erari“ aŭ ion similan. Kaj la nebelan titolon de ĉi tiu artikolo ni anstataŭigu per „vortoj, kiuj prefere manku“.

La emo traduki laŭvorte ofte evidentigas ankaŭ en nebezonataj pasivaj verboformoj. En nia lingvo abundas formoj kiaj: „men wordt verzocht; vele mensen werden getroffen door het ongeluk“ k.m. a., kiujn oni prefere traduku aktive, jene: „ni petas vin; la akcidento trafis multe da homoj“. Pri tiu temo oni legu la artikolon „Lingvaj sugestoj“ de Stellan Engholm en „Malgranda Revuo“, n-o 3a, '48a.

## LEGANTOJ,

ĉu vi faris vian devon, pagante vian abonon? Se jes, estu trankvilaj! Se via konscienco riproĉas...., pripensu, ke de vi dependos la sorto de „La Progresanto“!

## POR KOMENCANTOJ

H. Kuijt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Overgankelijke en onovergankelijke werkwoorden. (III).

In het Nederlands zijn ook de werkwoorden in de volgende zinnen nu eens overgankelijk, dan weer onoverganke-lijk.

A. Overgankelijk: De jongen hangt zijn jas in de gang. Mijn moeder kookt water in de ketel. De man verdrong de rat. Wij branden slechts anthraciet in de kachel.

Ontleding: Gezegde: hangt; onderwerp: de jongen; bepaling waar de handeling op overgaat: zijn jas; bepaling van plaats: in de gang.

B. Onovergankelijk: Mijn jas hangt in de gang. Het water in de ketel kookt. Zijn broer verdrong in zee. De kaars brandt de gehele nacht.

Ontleding (laatste zin): Gezegde: brandt; onderwerp: de kaars; bepaling van de duur ener handeling: de gehele nacht.

De werkwoorden in de zinnen A zijn overgankelijk gebruikt; in de zinnen B zijn dezelfde werkwoorden onovergankelijk. In Esperanto zijn deze werkwoorden slechts onovergankelijk, bijv.: *Mia surtuto pendas en la koridoro. La akvo en la kaldrono bolas. Lia frato dronis en la maron. La kandelo brulas la tutan nokton.*

Opm. 1. De bepaling *la tutan nokton* is rechtstreeks, echter niet omdat hier een handeling op over zou gaan, maar omdat het voorzetsel *dum* is weggelaten.

Opm. 2. In het Nederl. drukt men met hetzelfde werkwoord uit: a. het koken (bereiden) van voedsel; b. het koken van water. In Esperanto vertaalt men de handeling in a. met *kuir*, dit is overgankelijk, bijv.: *Mia patrino kuiras la terpomojn*; in b. met *boli*, dit is onovergankelijk, bijv.: *La akvo bolas*.

De werkwoorden: *pendi*, *boli*, *droni* en *bruli* kunnen in bovenstaande vorm dus niet overgankelijk voorkomen. Moet men vertalen: *De jongen hangt zijn jas in de gang*, dan maakt men het werkwoord *pendi* overgankelijk door achtervoeging van het achtervoegsel *ig*, bijv.: *La knabo pendigas sian surtuton en la koridoro*. Zo ook in de andere voorbeelden na A.: *Mia patrino boligas akvon en la kaldrono. La viro dronigas la raton. Ni bruligas antraciton en la forno*.

Samenvattend zegt men dus over werkwoorden: overgankelijke werkwoorden noemen een handeling, die kan worden

toegepast op een persoon of zaak; onovergankelijke werkwoorden noemen een handeling, die niet kan worden toegepast op een persoon of zaak. In het Nederl. kent men nog een derde soort werkwoorden n.l., die nu eens overg., dan weer onoverg. zijn. In Esperanto kent men slechts twee soorten n.l., overgankelijke en onovergankelijke. Aangezien het voor sommigen moeilijk is te onthouden welke werkwoorden van de derde soort in het Nederl. overg., en welke onoverg. in Esperanto zijn, raden wij aan de volgende zinnen van buiten te leren:

In het Nederl. overg. of onovergankelijk; A in Esperanto overgankelijk.

*Li rompas la glason.*  
*Li komencas la laboron.*  
*Li finas la laboron.*  
*Li ŝanĝas la tagordon.*  
*Li rulas la barelon.*  
*Li turnas la vizaĝon.*  
*Li fleksas la branĉojn.*

*La glaso rompiĝas.*  
*La laboro komenciĝas.*  
*La laboro finiĝas.*  
*La tagordo ŝanĝiĝas.*  
*La barelo ruliĝas.*  
*La vizaĝo turniĝas.*  
*La branĉoj fleksiĝas.*

B. in Esperanto onovergankelijk:

*La surtuto pendas.*  
*La akvo bolas.*  
*La rato dronas.*  
*La kandelo brulas.*

*Li pendigas la surtuton.*  
*Ŝi boligas akvon.*  
*Li dronigas raton.*  
*Li bruligas kandelon.*

Ter vertaling. Opgave 9.

Heb jij je jas al opgehangen, Jan? Jawel, Vader, zij hangt al in de gang. Door de storm verging het schip; alle opvarenden verdrongen. Jongens, ga niet te ver in zee, opdat jullie niet verdrinken! De man verdrong de muis in een emmer met water. Uit angst verbrandde hij alle papieren. Na enkele minuten brandde het hele huis. Zuiver water kook bij (*je*) een temperatuur van honderd graden. De kok kookte de aardappelen in de grote ketel. Kook geen water in die oude pan!

Vertaling van opgave 7.

Longan tempon<sup>1)</sup> mi staris antaŭ la domo. Mia plej juna frato dronis<sup>2)</sup> antaŭ ne longa tempo. La patro kuiris<sup>3)</sup> la manĝaĵon<sup>4)</sup>, ĉar la patrino estis malsana. Finfine la akvo<sup>5)</sup> ekbolis. Kiel<sup>6)</sup> ajn<sup>7)</sup> la viro serĉis, li ne povis trovi

sian libron. La sodatoj marŝis po<sup>8)</sup> kvin<sup>9)</sup> kilometroj en horo. Johano finlegis la belan libron en unu vespero. Pro la eksterordinara<sup>10)</sup> sekeco la domo ekbruligis<sup>11)</sup>. La<sup>12)</sup> pasintan<sup>13)</sup> jaron<sup>14)</sup> la tajloro faris por mi belegan kostumon<sup>15)</sup>. Ju pli diligente<sup>16)</sup> oni studas, des pli baldaŭ, oni fariĝos<sup>17)</sup> kapabla<sup>18)</sup> esperantisto.

1) Ook: dum longa tempo, 2) Niet: *droniĝis; droni* is onovergankelijk. Zie bovenstaande les. 3) Niet: *boligis*; d.i. water doen koken. Zie bovenstaande les. 4) Niet: *mangadon*; d.i. het eten als handeling; vergelijk: *La mangado okazis je la sesa horo. La mangajo estas bongusta*. 5) Niet: *Fine ekbolis la akvon; akvo* is onderwerp (*kiu ekbolis*) en dit krijgt nooit een N achter zich. 6) Niet: *kia*; dit correlatief is bijvoeglijk en vraagt naar een eigenschap van een zelfstandigheid, bijv.: *Kia estas la libro?* Antw.: *La libro estas bela*. In de vertaalde zin is sprake van de manier waarop de man zocht, men moet dus een bijwoordelijk correlatief gebruiken. 7) Niet: *ankaŭ*; de Nederlandse uitdrukkingen: *hoe ook, waar ook, waarom ook, hoeveel ook, wie ook* enz. worden vertaald door: *kiel ajn, kia* (eigenschap) *ajn, kie ajn, kial ajn, kiom ajn, kiu ajn*. 8) Niet: *marŝis kvin kilometrojn po horo*; *po* is geen vertaling

## ANSTATAŬ

Ĉe kelkaj studentoj ekzistas duboj pri la vorto „anstataŭ”. Ni klarigu la aferon:

„Anstataŭ” estas prepozicio kaj pro tio postulas nominativon: *Veniŝ s-ro A. anstataŭ s-ro B. Mi uzis poŝtkarton anstataŭ letero. Li venis je la 9a anstataŭ je la 8a.*

„Anstataŭ” povas esti ankaŭ subjunkcio. En tiu kazo ĝin sekvas infinitivo: *Li promenas anstataŭ labori. Li ŝatas amuzi sin anstataŭ studi.*

Sed povas sekvi ankaŭ indikativo aŭ kondicionalo. En tiu kazo oni aldonu „ke” aŭ „tio, ke”: *Mi preferas mem veni, anstataŭ ke mi venas leteron. Ni bone utiligu la tempon, anstataŭ tio, ke ni malŝparas ĝin babilante.*

La formo „anstataŭ tio, ke” estas pli korekta, same kiel „sen tio, ke” kaj „malgraŭ tio, ke”. Sed „anstataŭ ke” estas pli ofte uzata, ĉar sufiĉe flua. Kontraŭe, „sen ke” sonas tro krude.

En kelkaj frazoj „anstataŭ” povas havi akuzativon, nome, se uzo de nominativo kaŭzus miskomprenon: *Petro batis Paŭlon anstataŭ Vilhelmo* (Petro batis, ne Vilhelmo). *Petro batis Paulon anstataŭ Vilhelmon* (Petro batis Paŭlon, ne Vil-

van het Nederlandse woordje *per*, maar dient om aan te duiden, dat het woord dat er op volgt de hoeveelheid per eenheid weergeeft. Ook: *marŝis kvin kilometrojn en ĉiu horo*. 9) Niet zonder meer: *marŝis po kvin*; d.i. marcheerden met vijf op een rij. 10) Ook: *granda*. 11) Niet: *ekbruligis*; bestudeer bovenstaande les. Ook *bruliĝis*; waar dan mee bedoeld wordt: raakte in brand. 12) Niet zonder lidwoord; *pasintan jaron* — een vorig jaar, *la pasintan jaron* — het vorige jaar. 13) Ook: *antaŭan*. 14) Niet zonder N; d.i. een rechtstreekse bepaling. 15) Minder juist: *veston, vestaron*; d.i. resp. kledingstuk en verzameling kledingstukken. 16) Ook: *fervoja*; het verschil tussen beide woorden is dat de stam *diligent* bijvoeglijk is; de stam *fervor* is zelfstandig, van beide kunnen dan andere woordsoorten worden afgeleid. Vergelijk het kleine verschil: *Li estas diligenta (studema) lernanto kaj fervora (propagandema, laborema) esperantisto*. 17) Niet *faras*; d.i. maken, bijv.: *li faras sian taskon*. 18) Ook: *lerta, sperta*. 19) Niet: met N; d.i. onderwerp. H. de B. en R. 6, G. H. de N. en R. 5, P. W. W. en G. 7, R. en R. 5, Stelano 8, K. L. en U. 9, F. T. en A. 7, Astor 9, W. M. en A. 8, J. R. 6.

EN OKTOBRO KOMENCIGOS NIAJ NOVAJ SKRIBAJ KURSOJ. NE RESTU la eterna komencanto, aliĝu al la A-KURSO

Daŭro: 8 monatoj  
Prezo: f 9.—

FARIĜU kapabla instruanto de nia bela lingvo, aliĝu al la B-KURSO

Daŭro: 12 monatoj  
Prezo: f 12.—

SPERTIGU en organizaj aferoj, aliĝu al la

## FUNKCIULA KURSO

Daŭro: 8 monatoj  
Prezo: f 9.—

PROPAGANDU la skriban ELEMENTAN KURSON

Daŭro: 30 semajnoj  
Prezo: f 13.50

Petu informojn al:

INSTRUA SERVO FLE  
Roelantsstraat 4,  
AMSTERDAM-W.

helmon). Tiun akuzativon oni povas motivi, konsiderante la propozicion „anstataŭ Vilhelmo(n)” kiel elipsan propozicion, kiu kompleta tekstus aŭ: *anstataŭ ke batis Vilhelmo*, aŭ: *anstataŭ bati Vilhelmon*.

## DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

J. Lem.

Opgave 10. Vertaal in Esperanto:

EEN BEZOEK AAN DE AMSTERDAMSE DIERENTUIN. (vervolg).

Wie zich interesseert voor het leven der insecten, vergeet niet het insectarium (*insektario*) te bezoeken. Daar kunnen wij allerlei in- en uitheemse (*en-kaj eksterlandaj; enlandaj kaj ekzotikaj*) insecten in de verschillende stadia van de gedaanteverwisseling (*metamorfozo*) zien. Let (eens) op, hoe de geheimzinnige mierenleeuw (*mirmeleono*), een larf van een soort libel, verborgen in een zandkuiltje, zodat hij nauwelijks zichtbaar is, van tijd tot tijd een zandkorrel naar boven schiet om een mier of een ander klein insect, dat op de helling van het kuiltje loopt, te treffen. Getroffen door zulk een kogeltje, rolt (*rultalas*) de mier omlaag. Zij tracht naar boven te klimmen. Weer treft een kogeltje haar; weer valt zij naar beneden, totdat eindelijk de verschrikkelijke kaken van haar belager haar grijpen. Wat slim is die mierenleeuw, denkt ge misschien. Dat is echter geen slimheid; de mierenleeuw wacht niet doelbewust (*celkonscie*) op de prooi om haar naar beneden te schieten. Zij handelt slechts volgens haar natuurlijke aandrift. Ook als geen enkel insect zich in de nabijheid van het kuiltje bevindt, schiet hij van tijd tot tijd zijn kogeltjes af.

Het leven der bijen kan men gadeslaan in een van glasruiten voorziene kast. Duizenden nijvere werksters ziet men zich bezig houden met het bouwen der raten (*ĉelaroj*), het aanbrengen van voedsel enz.

Ruige (*harplenaĵ, vilaj*), giftige vogelspinnen (*migaloj*) doen vooral de dames griezelen (*naŭzotremigi*).

Merkwaardig zijn de wandelende takken en bladeren (*promenantaj branĉoj kaj folioj, fasmoj kaj filiumoj*). Die insecten lijken zo zeer op takken, respectievelijk op bladeren, dat het de leek enige moeite kost ze te vinden. Kleur en vorm beschermen hen tegen toevallige vijanden. Over de verschillende in- en uitheemse kevers, vlinders, enz. zal ik niet spreken (*mi ne parolu*); daarvoor ontbreekt mij voldoende ruimte.

Nu naar het reptielenhuis. Schijnbaar dood liggen grote krokodillen op de zandige oever van het meerje of tussen het groen der bladeren. Prachtige tropische gewassen geven aan alles een betoverende, vreedzame sfeer. Maar, let op, daar komt de oppasser (*prizorganto*) om

de geschubde monsters te voederen. Weg is de rust. Bliksemsnel glijden de krokodillen het water in om, al wachtende, het toegeworpen vlees te grijpen. Nu kunnen wij ons enigszins voorstellen, hoe gevaarlijk die op liggende boomstammen gelijkende, nauwelijks in het groen van het gebladerte waar te nemen dieren kunnen zijn.

(*Wordt vervolgd*).

Vertaling van oefening 9.

VIZITO AL LA AMSTERDAMA ZOOLOGIA GARDENO.

(Daŭrigo).

Nun ni iras al la porsimia roko. Vidu kiom (kiel) petolemaj kaj facilmovaj niaj kvarmanaj amikoj estas. Iliaj membroj estas tute konstruitaj (arangitaj) por grimpadu kaj saltado. Jen sidas patrin-simio kun ido. La ido alkrugiĝas per la fingroj al la brustharoj de la patrino. Subite la patrino eksaltas, grimpas sur arbotrunkon (surgrimpas arbotrunkon) kaj saltas sur la rokon. Senmove la ido restas pendanta sur la brusto de la patrino. Estas preskaŭ nekredible kiom da forto estas en tiuj fingretoj (kiom fortaj estas tiuj fingretoj). Tie du simioj sidas unu apud la alia. Unu antaŭen klinas la kapon, dum la alia ŝajne serĉas ion inter la haroj de sia kunulo. De tempo al tempo la fingroj kaptas ion kaj metas tion en la buŝon. „Ba” („fi”) diras unu (iu) el la ĉirkaŭstarantoj, „ĝi kaptas pulojn kaj manĝas ilin.” Trankviligu vin, indigna rigardanto, simioj ne havas pulojn. Sed, kion ĝi do faras? En la malsekajo, kiun la ŝvitglandoj sekrecias, troviĝas salo, kiu sub la influo de la aero kristaliĝas kaj algluiĝas al la haroj. Tiuj ĉi salkristaletoj estas frandaĵo por la simioj. La t.n. „senpulgado” ankaŭ utilas kiel provo pri amikeco kaj submetiĝo. Se simio volas montri al vi sian amikecon, ĝi faras „senpulgigan” movon sur la mano, kiun vi etendas al ĝi aŭ, se ĝi ne povas atingi vin, eĉ sur la planko. Se malpli granda simio estas minacata de pli granda, vi kelkfoje povas vidi, ke la minacato ekkuaŝas, kvazaŭ invitante sian insidanton „senpulgigi” ĝin. Provo pri submetiĝo.

Ankaŭ la antropoidoj (antropoidaj simioj, homsimilaj simioj) meritas nian atenton. Al ili apartenas: la orangutango, la ŝimpanzo, la gorilo k.s. Valoras la penon atente observ(ad)i la konduton de ĉi tiuj rimarkindaj bestoj. Mi iam vidis sur la estinta ludkampo kiel orangutango volas kapti la foliojn de malsuprenpendanta branĉo de platano. Car ili estis

## POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen

Vertalingen voor deze rubriek zenden voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres: Roelant, straat 4, Amsterdam-W.

Opgave 11: Vertaal in Esperanto:

Hoe komt het, dat een kreupele ons niet ergert en een kreupele geest ons wel ergert? Omdat een kreupele erkent, dat wij recht lopen en een kreupele geest zegt, dat wij het zijn, die hinken. Als het anders was, zouden we medelijden met hem hebben en er ons niet kwaad om maken.

Waarom worden we niet kwaad, als men zegt, dat we hoofdpijn hebben en wel, als men beweert, dat we slecht redeneren of slecht kiezen?

De oorzaak ervan is, dat we heel goed weten, dat we niet hinken en dat we geen hoofdpijn hebben, maar we zijn er veel minder zeker van, dat we het ware kiezen, zodat wij, als wij merken, dat een ander anders oordeelt, in de war raken, en vooral, wanneer duizend anderen met onze keuze spotten. Dan moeten we ons eigen inzicht verkiezen boven dat van zoveel anderen en zo iets is gewaagd en moeilijk. Onze zintuigen leveren, aangaande een kreupele, nooit zo'n tegenspraak op.

(Pascal)

KIOM 1) ONI FORFUMAS 2)

Oni jam ofte diris, ke oni ĉiujare 3) per cigaroj, cigaredoj kaj tabako aliformigas tiom da mono en fumon 4). Estas tamen ĉiam denove interese 5) vidi ĉi tiun nombron 6). Dum 1939a 7) ĝi sumis 8) por 9) cigaroj f 70 milionojn 10), por cigaredoj f 54 milionojn, por fumtabako f 21 milionojn, entute 11) f 145 milionojn aŭ proksimume 12) po 13) f 54 por vira nederlandano superanta la 15-jaran aĝon 14). Por havi kompar(a)jon: la konsumo 15) de sukero atingis 16) dum

la sama jaro proksimume f 115 milionojn, do nur 3/4 17) de tiu de tabako. Konata estas la kresko 18) de la fumado dum jaroj de granda agito 19). Ekzemple 20) la tabakkonsumo dum 1937a sumis f 145 milionojn. El ĉi tio klare evidentiĝas 21), ke la fumado por multaj (homoj) estas 22) nervotrunkvilita rimedo. Ni esperu, ke baldaŭ venu 23) malaltiĝanta 24) konsumo!

(Cijfers Stat. Zakboek 1940)

1) Het gaat hier om de vraag „hoeveel”.  
2) Gewoonlijk vertaalt men in de bedrijvende vorm. In de lijdende vorm gebruikte men een lijdend deelwoord op *e*: *Estas ofte dirite*. 3) Beter dan *jare*. Dit woord kan ook op 1 jaar betrekking hebben. 4) Ook: *malaperas en fumon*. 5) Daar het zelfst. naamw. ontbreekt, blijft de bijwoordelijke vorm gehandhaafd. 6) „Cifero is slechts één cijfer. Ook: *sumon*. 7) Het jaartal is een rangtelwoord: het 1939ste jaar. 8) Ook: *ĝi estis f 70 milionoj*. 9) Hoewel weinig gebruikt, is *pri* of *koncerne* wellicht duidelijker. 10) Ook: *70 milionoj da guldenoj*. 11) Ook *kurie, sume*. 12) Ook: *ĉirkaŭ*. 13) Niet: *po vira nederlandano*. De aanduiding „po” staat vóór de hoeveelheid per eenheid. Ook: *54 guldojn*. 14) Ook: *por ĉiu vira nederlandano pli aĝa ol 15-jara (15 jarojn)*. 15) Niet: *uzo*. 16) Ook: *estis sumis*. 17) Ook: *tri kvaronojn*. 18) Ook: *pligrandiĝo, plivastiĝo, plintensigo*. 19) Ook: *maltrankvilo, grava ekscit(ec)o*. 20) Ook: *tiel*. De ware betekenis van „zo” is echter: bijvoorbeeld. 21) Ook: *montriĝas*. 22) Ook: *servas kiel*. 23) Omdat hier in „esperu” een wens ligt opgesloten, gebruikte men bij voorkeur de aanvoegende wijs. 24) Ook: *malgrandiĝanta*.

Beoordeling: A. L. te G. 9; J. T. te D. 7; L. P. te R. 7; G. H. de N. te R. 5; A. A. D. te Z. 5; P. U. W. te Gr. 5; Astor 9; G. A. te R. 6.

ekster ĝia atingpovo, ĝi alportis malgrandan keston kaj ekstaris sur ĝin; la besto ankoraŭ ne povis atingi la foliojn; tiam ĝi prenis bastonon kaj klopodis per ĝi bati la foliojn. Jen ni vidas kiel la orangutango laŭ primitiva maniero uzas ilon. La homo prilaboras sian bastonon, faras el ĝi sagon, hakflon, martelon aŭ ion tian por iom pli bone atinge sian celon. Al la besto, do ankaŭ al la antropoido, mankas tiu ĉi kapablo. Oni pripensu: homsimilaj simioj ne estas simisimilaj homoj.

(Daŭrigota).

Korektoj: opgave 8, paĝo 51a, 3a linio de malsupre:

*West-Indië d.e. westelijk Indië.*

Vertaling van opgave 8, paĝo 61a, 19a linio de supre:

*varmigaj d.e. vermegaj; linio 2a de malsupre:*

*Okcidenta Azio d.e. okcidenta Hindujo.*

L. H. P. en R. 7; P. M. W. en G. 6; C. v. S. en R. 5; J. R. en A. 8; G. A. en R. 7; J. M. T. en D. 9.

## NOMOJ DE KELKAJ PLEJ OFTAJ NEDERLANDAJ BIRDOJ

G. F. Makkink.

(Fino).

Voor verklaringen der letters tussen ( )  
zie Juni-no.

Huisemus — *Passer domesticus* — dom-  
pasero (SM—UV)

Ringmus — *Passer montanus* — mont-  
pasero (M—UV)

Vink — *Fringilla coelebs* — fringo (UV)

Keep — *Fringilla montifringilla* — mon-  
tofringo (S—UV)

Kneutje — *Carduelis cannabina* — kana-  
ba kardelo (S—UV), kanabeno (PV)

Barmsijsje — *Carduelis flammea* — hela  
kardelo (M—UV)

Putter — *Carduelis carduelis* — karde-  
lo (UV)

Sijsje — *Carduelis spinus* — dornkardelo  
(M—UV), fringelo (UV)

Groenling — *Chloris chloris* — verda  
fringo (S—UV)

Europese kanarie — *Serinus canarius* —  
sovaĝa kanario (M—UV)

Kruisbek — *Loxia curvirostra* — kruc-  
bekulo (SM), loksio (PV)

Goudvink — *Pyrrhula pyrrhula* — pi-  
rolo (UV)

Geelgors — *Emberiza citrinella* — flava  
emberizo (S—UV)

Ortolaan — *Emberiza hortulana* — ĝar-  
denemberizo (S—UV), hortulano (UV)

Rietgors — *Emberiza schoeniclus* — kan-  
emberizo (S—UV)

Grauwe gors — *Emberiza calandra* —  
granda emberizo (S—UV)

Sneeuwgors — *Plectrophenax nivalis* —  
neĝemberizo (S—UV)

### POSTSKRIBO ĈE LA BIRDONOMOJ.

La listo de la plej oftaj nederlandaj  
birdonomoj ĉe kelkaj legantoj certe  
kreskigis demandojn; unualoke kial mult-  
taj nomoj ne estas prenitaj el la scienca  
nomprovizo. La zoologia nomenklatur  
ja estas internacia kaj kial do ignori  
ĝiajn nomojn?

Nu, la afero de nomdonado estus sufiĉe  
facila, se ni nur bezonus ortografii Espe-  
rante la latinajn aŭ grekdevenajn scienc-  
ajn nomojn. Precipe tri kontraŭoj ek-  
zistas, kiuj devigas nin ofte iri laŭ alia  
vojo.

Unue la sciencaj nomoj ne en ĉiuj kazoj  
estas la plej internaciaj. Por oftaj kaj  
multkonataj kreiraĵoj kiel ĉevalo, kato,  
hundo, mevo, najtingalo ktp. multe pli  
da homoj konas la popolan nomon ol la  
sciencan. Se kelkaj naciaj lingvoj liveras  
unu saman radikon, tiu nomo sendube  
pli respektas la principon de interna-

cieco ol la scienca nomo, kiun ja konas  
nur la scienculoj kaj amatoroj. Tial Za-  
menhof prenis ekz. *ĉeval'* el la romanaj  
lingvoj kaj ne *Equus* el la zoologio. Por  
maloftaj bestoj, kiuj ordinare interesas  
nur zoologojn, la sciencaj nomoj ĝene-  
rale povus esti pli rekomendindaj kiel  
bazo por la Esperanta nomdonado ol  
la naciaj nomoj, kiuj por tiaj bestoj ofte  
eĉ mankas.

La dua kontraŭo al nura imitado de la  
sciencaj nomoj estas la fakto, ke tiuj  
ofte ne estas konstantaj. Oni memorigu  
al si la nomojn *Geranium*, *Hortensia*,  
*Amaryllis* k.t.p. por tre konataj ĉam-  
broplantoj. En la botaniko tiuj nomoj  
devis cedi lokon al *Pelargonium*, *Hy-  
drangea* kaj *Hippeastrum*. Kial? Ĉar la  
nomdonado obeas en la sciencoj inter-  
konsentitajn regulojn, de kiuj la fakuloj  
ne rajtas flankeniĝi. La plej grava regulo  
estas tiu de la plejfrueco. Tio signifas,  
ke besto aŭ planto devas havi tiun nom-  
on, kiun donis al ĝi la unua priskribinto  
post la apero de la deka eldono de ver-  
ko de la biologo Linné (1707-78). La  
regulo same regas la nomojn de genroj  
kiel de specioj!). Ĝi ŝajnas simpla, sed  
fakte kaŭzas ĝajnon, ĉar oni ofte mal-  
kovras publikigaĵon, en kiu troviĝas no-  
mo kaj priskribo de pli frua dato por  
jam nomita kreiraĵo. Tiam oni devas  
cedi pri la kutima nomo.

Alia neceso por ŝanĝo devenas de la  
kompara studo de la strukturo kaj ka-  
rakteroj de planto aŭ besto. Kiam es-  
ploristo povas pruvi aŭ rezonadi, ke ia  
planto ne apartenas al genro A sed al  
genro B, oni devas ŝanĝi ĝian genran no-  
mon konforme al la nova konkludo. Io  
simila okazas, kiam sistem esploristo  
apartigas ian genron je kelkaj genroj.  
La novaj genroj tiam ricevas novajn no-  
mojn kaj la ekzistantaj nomoj devas esti  
ŝanĝataj.

Tiom longe kiam pli fruaj nomoj povas  
esti trovataj, kaj tiom longe kiam pri-  
sistemaj studoj povas trovi kialojn por  
plibonigi la algrupigojn de la plantoj  
kaj bestoj, tiom longe la sciencaj nomoj  
ŝanĝiĝos. Ĉiu samopinias kun mi, ke en  
Esperanto ne regu tiu malkvieta stato  
en la nomaro.

La tria motivo kontraŭ nura akceptado  
de latinaj nomoj estas, ke la scienco ofte  
distingas multajn genrojn, kie la laikoj  
nur vidas unu komunan tipon de planto  
aŭ besto. Prenu la kazon de la strigoj.  
En Nederlando observiĝis naŭ strigo-  
specioj, apartenantaj al ok genroj! Se ni  
kreis nomojn laŭ la scienco, ni devus

enkonduki eĉ ok nomojn por tiuj birdoj, en kiuj la plejgranda parto de la laikaro rekonas nur unu tipon: la strigo. Do, ni estu singardaj kaj ne importu neologismojn laŭ scienca ekzemplo, se ni same bone povas helpi nin per malmultaj nomradikoj en kombino kun specialaj Esperantaj adjektivoj. Mi ekhavis la fortan impreson, ke Zamenhof siatempo ne tute supervidis la malfacilaĵojn, kiujn kaŭzas la imitado de la sciencaj nomoj. Li faris ekz. la nomojn *korvo*, *korniko*, *fruĝilego* kaj *monedo* por kvar nigraj korvosimilaj birdoj, kiujn laikoj ordinare rekonas nur kiel simplan korvon. Por eviti la neologismajn radikojn sufiĉus, se ni havus: *granda korvo*, *nigra korvo*, *kampa korvo* kaj *turkorveto*. Kompreneble ni ne tuj forigu la ekzistantajn kaj kutimiĝintajn nomojn, se ili ne estas nepre eraraj. Sed tamen ni moderigu nian inklinton tuj Esperante ortografii sciencajn nomojn.

Nun, kiam la laŭscienca vojo restu por ni ĝenerale nekonsilinda, ni konsideru pli fruktodonan vojon. Respektante la principon de internacieco, ni ja bone povas ĉerpi al la riĉa fonto de la naciaj lingvoj. Ili estas multe pli neŝanĝaj ol la sciencaj, kvankam ofte ekzistas sinonimoj. La angla kaj franca lingvoj (eble pliaj) liveras ekz. la radikon *greb'* por *Podiceps*, kiu pro tio estas preferinda super la laŭscienca nomo *podicepso*. La angla, franca kaj germana lingvo (eble pliaj) prezentas la radikon *pipi'* por birdo, kiu nomiĝas science *Anthus*. Tiu ĉi sonimita nomo meritas nian preferon.

Do, se naciaj lingvoj liveras komunan radikon, Esperanto elektu tiun super la scienca.

En aliaj kazoj diversaj naciaj lingvoj komune indikas beston aŭ planton per samsignifa nomo ekz. *roodborst*, *redbreŝt*, *rouge-gorge*, *Rotkehlchen*. Por tiu ĉi birdo la Esperanta traduko *ruĝgorĝulo* estas pli plaĉa kaj pli internacia ol la ortografiaĵo de *rubecula* (*rubekolo*). Tiel tradukante Esperanten, ni respektas la principon de internacieco kaj samtempe transprenas multan ĉarmon kaj multajn folklorajn valorojn en Esperanton el la riĉa popollingva fonto. D-ro Neergaard pledas la saman sintenon en sia valora libro „Fremdvortoj en Esperanto“. La principo de evitado de neologismoj rekomendas al ni ignori multajn sciencajn genrajn nomojn. Tiel ekz. la multaj anasgenroj ne ricevu en Esperanto ĉiu sian propran laŭsciencajn radikon, sed restu anaso kun aldone adjektiva nomo por indiki la specion. Por tiu specia nomo ni povas traduki, ĉu laŭ la naciaj, ĉu laŭ la scienca nomo. Zamenhof mem antaŭiris, donante en „Universala Vortaro“ tri ekzemplojn por bestoj, nome *molanaso* por *Somateria*, *sonserpento* por *Crotalus* kaj *norda cervo* por *Rangifer*. G. F. Makkink.

4) Laŭ ekzemplo de D-ro C. Stoep-Bowitz, Oslo mi uzas *specio* por speco en la preciza, biologia signifo. Al tiu ĉi kolego mi ŝuldas dankon pro lia bonvola trarigardo de la listo kaj liaj ŝatataj rimarkoj.

## TRA NIA LITERATURO

Galileo Galilei, de Bento de Jesus Caraça. Tradukis al la portugala lingvo Manuel de Freitas.

Ĉi tiu libreto pritraktas la vivon de Galileo Galilei kaj koncize klarigas la diferencajn sistemojn kaj opiniojn pri la universo.

Kvankam Galilei pro hontinda verdikto ne rajtis diskonigi siajn spertojn kaj sciencajn konojn, akiritajn helpe de novkonstruita lorno, li tamen restis firme konvinkita pri sia pravo. Famkonataj fariĝis liaj vortoj „E pur si muove“ = kaj tamen ĝi moviĝas (la tero).

La stilo estas flua kaj la lingvo bona. (Ĝin kontrolis la Literatura Komitato de F.L.E.)

Oni ofte renkontas „l'“, ne nur antaŭ vokaloj, sed ankaŭ antaŭ konsonantoj. Por *laŭtleĝi* (pĝ. 15a) ni preferus *voĉlegi*. Ĉe la komparativoj la tradukinto konsekvence aplikas *tiom*; sed kial sur paĝo 26a: *tiel embarasa? Forperdinta*

(21) ŝajnas al ni pleonasma. Propraj nomoj ne postulas la artikolon, do ne la *Egea Maro* (34), *l' Nilo* (19) (Vidu i.a. Kabe: „Faraono“). Duba kunmeto estas *Malgrandazio*. Sur jenaj bazoj (34) ne artikolo, sed en la analoga kazo la *jenan rimarkigon* (35) ni trovis ĝin. En la sekvanta frazo ni preferus la direktan n: *ideoj, tuj poste ĉiudirekte(n) jetataj* (50); kaj *alrigardi* en la jena frazo estas nekutima; *Ni alrigardu (konsideru) tiun alian fluan* (31).

Kelkaj aprobindaj esprimoj estas i.a.:  *fekunda ideo, el kiu naskiĝos...* (24); *ni ne anticipu* (erop vooruitlopen) (27); *A. estis la unua kiu aŭdacis forpuŝi la Teron el ĝia privilegia pozicio* (27); *sub la ombro de estintaj kompetentuloj* (33); *la scienco ruliĝas sur glitiga deklivo* (36); *klarigi larĝatrajto* (41); *ĝi trafis la kulminon de sia viglo* (49).

Entute: tre rekomendinda kaj instrua verketo. J. v. Scheepen.

## DE EXAMEN-VAKKEN

### 3. DE VERTALING ESPERANTO— NEDERLANDS

Voor het schriftelijke werk zou je zo rustig kunnen gaan zitten, ware het niet, dat de mogelijkheid, elk ogenblik voor het mondelinge gedeelte te worden geroepen, de candidaat voortdurend in spanning houdt. De zekerheid, dat de tijd voor het schriftelijk werk gegeven, daarvoor toch toereikend is, moet evenwel een geruststelling zijn. Vooral de zenuwachtige candidaten hebben die verzekering nodig.

Voor deze taak moeten wij op enkele belangrijke factoren wijzen, die door de candidaat maar al te vaak worden veronachtzaamd.

Menigeen vat de vertaling in het Nederlands veel te licht op. Nederlands kent men toch immers wel; het gaat juist om Esperanto! — Deze gedachtengang is niet juist. Ook al begrijpt men de inhoud van een Esperanto-tekst volkomen, dan nog eist het voldoende kennis en een zekere ervaring daarvoor de juiste Nederlandse bewoordingen te vinden.

Vóór alles moeten we aanraden: vertaal niet te woordelijk! Meen niet, dat uw vertaling alleen dan correct is, als ze woord voor woord de Esperanto-tekst volgt. U beschikt over tijd genoeg, ook over kladpapier. Welnu, handel dan zo: vertaal elke zin eerst in klad, desnoods woordelijk, en tracht er dan direct daarop een passende Nederlandse vorm voor te vinden, die u dan in het net overbrengt. Bedenk, dat de Nederlandse zin zó moet luiden, dat hij in een vertelling uw eigen woorden moet kunnen weergeven. Dus geen stijve uitdrukkingen, die u zelf nooit zou zeggen. Dit geldt vooral de werkwoorden, de z.g. samengestelde tijden en de deelwoorden. Ontmoet men in Esperanto een eenvoudige verleden tijd, b.v. *okazis*, dan zijn er twee mogelijkheden van vertalen: óf het moet zijn *gebeurde*, óf *is gebeurd*. Meestal zal

de tweede de juiste blijken. Regels behoeven wij hiervoor niet aan te geven. Hier moet 't gevoel u de weg wijzen. Kies dus gewone, dagelijkse woorden, geen stugge vormen, die uzelf zeker niet zou gebruiken.

Een ernstige fout is het dit vertaalkvak te onderschatten. Bij vele cursisten valt het al te constateren, dat zij de vertalingen in het Nederlands verwaarlozen. Op het examen blijkt dan, dat zij zich in dit vertalen niet voldoende hebben geoefend. Wij raden dus ernstig aan meer tijd en zorg aan dit vertaalkvak te besteden in uw examenvorbereiding. Bedenk, dat uw Nederlandse vertaling er als gewoon Nederlands moet uitzien. Ze moet ook niet onmiddellijk als een vertaling te herkennen zijn.

Het is juist dit examenvak, dat bij sommige candidaten van een grote slordigheid blijk geeft. Punten op de *i*'s, leestekens, hoofdletters ontbreken vaak; hele zinnen zijn soms niet te ontcijferen of staan in een onmogelijke vorm. Dat alles kan en moet vermeden worden. Schrijf en vertaal — ook in klad — altijd met zorg. Bedenk, dat anderen uw werk moeten kunnen lezen en beoordelen, en tracht in uw eigen belang bij die anderen een zo gunstig mogelijke indruk van uw nauwkeurigheid te vestigen.

Treft u in de opgaaf een onbekend woord aan, en kunt u de betekenis er van niet uit het zinsverband afleiden, dan kunt u het beter onvertaald laten dan een vertaling te fantaseren, waardoor soms iets heel ongerijms ontstaat. Zo vertaalde een candidaat eens *baskoj* (rokspannen) met *bakkebaardjes*. Een overigens wel geleerd woord kan u op het juiste ogenblik in de steek laten. Ga dan met uw werk door; even later schiet het u wel te binnen.

Is uw vertaling af en rest u nog enige tijd, zie dan het werk nog eens grondig door. Er valt altijd nog wel iets aan te verbeteren. Laat geen minuut onbenut!

Dem.: Mi trovis strangan kontraŭdiron inter „De Voorzetsels” kaj „La Konsilanto”. En la unua libro mi trovas „po 60 km en (dum) horo; po 25 cendoj por funto; gajni po 65 cendoj en (dum, por) horo” (pg. 66). En la alia libro „po” en tiuj kazoj estas nomita „superflua lukso” (pg. 34). Kiel mi klarigu tion?

Resp.: La kontraŭdiro estas nur ŝajna. „De Voorzetsels” traktas la prepoziciojn en plej vasta senco, kaj por tio havigas ĉiajn ekzemplojn, la konsilindajn,

sed ankaŭ la ne tre rekomendindajn, la „superflue luksajn”. „La Konsilanto” atentigas pri la superflueco de ĉaj ekzemploj, sed ne nomas ilin eraraj. Gramatike la menciitaj ekzemploj estas korrektaj.

Dem.: Kiel traduki „ruilverkaveling”?  
Resp.: Parcelintersanĝo (= intersanĝi parcelojn).

Dem.: Kiel traduki „het zuur hebben”?  
Resp.: Rukti pro pirozo (maagzuur) aŭ senti ĝeno pro pirozo.

